

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE


merkredon, la 3-an de Julio, 2013 • numero ok

Kio okazos hodiaŭ?

★ 8:30 atm – tagmezo:

Lecionoj

Flowe, unua etaĝo



★ tagmezo: grupfoto

Ŝtuparo apud Belk Dining Hall

★ 2:00 – 3:00 ptm:

Prezento pri Meksiko

Flowe, unua etaĝo

Vicente gvidos nin al la moderna urbo kaj ŝtato de la ĉicahualoj, ene de la lando de la aztekoj. Meksiko estas plurkultura lando kie oni povas ĝui ne nur la belajn pejzaĝojn kaj antikvan historion, sed ankaŭ la modernan vivon.

★ 7:00 – 8:00 ptm:

Filipo parolas pri sia “ranregistrilo”

Flowe, unua etaĝo



Ĉu vi maltrafis pasintajn numerojn de la Fasko? Ĉiuj estas haveblaj en nia ret-arĥivo:

<http://esperanto.org/nask>

La NASKa Fasko

Redaktejo: Finley 112


<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

La diskurso “Gettysburg”

de Ben SPEAKMON



Hodiaŭ, la 3-a de Julio, estas la 150-a datreveno de la batalo de Gettysburg, la plej granda batalo de la usona enlanda milito. Je la 19-a de Novembro 1863, prezidanto Abraham LINCOLN deklamis ĉi tiun mallongan paroladon sur la batalkampo.

En tiuj ĉi vortoj, mi ĉiam kredas, estas io esenca pri tio, kion signifas esti usonano, do mi penis traduki ilin por vi en nian komunan lingvon. Mi tre dankas al Liĉjo kaj Hoss por iliaj afablaj kaj uzeblaj konsiloj.



Antaŭ kvar dudekoj kaj sep jaroj, niaj patroj naskigis sur ĉi tiu kontinento novan nacion, koncipitan en libereco, kaj dediĉitan al la propono, ke ĉiuj homoj estas kreitaj egalaj.

Nun ni estas okupitaj en granda enlanda milito, provanta ĉu tiu ĉi nacio, aŭ ia nacio tiel koncipita kaj tiel dediĉita, povas longe daŭri. Ni kunvenas ĉe granda batalkampo de tiu milito. Ni venis ĉi tien por dediĉi parton de tiu ĉi kampo, kiel

finan ripozlokon por tiuj kiuj ĉi tie donis siajn vivojn tial, ke tiu ĉi nacio povus pluvivi. Estas tute en ordo kaj ĝuste, ke ni faru tion.

Sed, en pli granda senco, ni ne povas dediĉi – ni ne povas konsekri – tiun ĉi grundon. La kuraĝaj viroj, vivintaj kaj mortintaj, kiuj luktis ĉi tie, konsekris ĝin ege preter nia malforta povo pliiĝi aŭ malpliigi. La mondo nek rimarkos, nek longtempe memoros, tion kion ni diras tie ĉi, sed ĝi neniam povus forgesi, kion ili faris tie ĉi. Estas pli ĝuste por ni, la vivantoj, dediĉi nin ĉi tie al la nefinita laboro, kiun ili, kiuj batalis ĉi tie, tiel noble progresigis. Pli ĝuste por ni, tie ĉi dediĉi nin al la granda laboro restanta antaŭ ni – ke el tiaj honoraj mortintoj ni pli dediĉas nin al la celo por kiu ili donis la finan, plejplenan dediĉon – ke ni ĉi tie decidegas, ke tiaj mortintoj ne mortis vane – ke tiu ĉi nacio, sub Dio, havos novan naskiĝon de libereco – kaj ke la registraro de la popolo, per la popolo, pro la popolo, ne pereos de la tero.



Afero tre bedaŭrinda

de Ralph CRAIG

[Noto de la redaktoro: Derek petis siajn lernantojn verki mallongajn rakontojn uzante nur la cent plej oftajn morfemojn de Esperanto. Jen unu el la spritaj rezultoj.]

Marko: Ĉu vi scias pri la malbona afero?

Karlo: Jes, sed mi ne volas paroli pri ĝi.

Marko: Ĉu vi vidis la tutan aferon?

Karlo: Jes. Kion mi vidis, ne eblas ne vidi.

Marko: Ĉu multaj homoj estis manĝitaj?

Karlo: Kvindek tri el la kongresantoj!

Komparo

Verkita pri kelkaj tagoj en Miami de Prof. Ricardo Salazar CRESPO.

“Meze de la vivvojo...”
Ekkomencis la Dia Komedio.
“En loko el La Mancha”
Komencis Cervantes libron.

Ĉu kaj mi, kie komenci,
Por atingi ekvilibron,
Kamparano kun fosilo,
Kaj profesoro kun libro?

Serĉanta tra la paŝtejo
Fruktojn falantajn, maturajn,
Kaj tie ĉi tute enfermita,
Atendanta lumon puran.

Lukso, libera abundego;
Aŭtoj svarmas surstrate.
Sed por eviti danĝeron,
Vivo soleca, privata.

Vento, suno, grundo,
Amaso ĉiam salutanta,
Vizitante la najbarojn
Vivo-signifon ne mankas.

Artifikaĵoj diversloke,
Varoj luksaj koketantaj,
Fruktoj neniam maturaj
Kiel en mia grundo falantaj.

Enigmoj: Loknomaj anagramoj

de Derek ROFF

Por ĉiu el la sekvaj enigmoj, la solvo estas en formo de loknomo kaj ties anagramo. Ekzemple: kiel oni nomus “aferojn, kiuj fermas pantalonojn en la franca ĉefurbo”?

Nu, per **pariza ziparo**, kompreneble. Ĉu komprenite? Bone, do jen aliaj. La solvoj aperos morgaŭ.

1. Loko en la Rokmontaro kun tre forta suno.

2. Se oni fokus novan ligan al la oceano ĝis lia domo, tie la Papo ŝajne naĝus.
3. Priskribu la foje konfliktan etoson de la Centra Oficejo de UEA.
4. Muziko el Hermsillo.
5. Purigi faman lokon por skii en Koloradio.
6. (kun liga vorto inter la du anagramoj) Trans la generacioj, tiu, kiu fariĝus reĝo, se sud-aŭstralia urbo havus monarkion.

Ĉu viaj ranoj blekas sane?

Hodiaŭ vespere, Filipino DORCAS de Teksaso prezentos informon al ni pri ranregistriloj.

Ĉu vi havas ranojn en via najbarejo? Ĉu ranoj ekzistas proksime de tie, kie vi loĝas aŭ pasigas tempon? Kion vi scias pri ili? Kiel fartas viaj ranoj? Ĉu vi aŭdas ilin? Ĉu vi aŭskultas ilin? Ĉu ranoj de via regiono blekas bele kaj sane? Se jes, bone! Se ne, kial ne? Venu kaj informiĝu pri ranregistriloj.

